


KIR BULIČOV
LA KNABINETO,
AL KIU
NENIO OKAZOS



KIR BULIČOV

LA KNABINETO, AL KIU NENIO OKAZOS

**Rakontoj pri vivo de malgranda knabineto el XXI jarcento, skribitaj fare de
ŝia patro**

**Tradukis Barbulo
Ilustris I.Migunov**



ANSTATAŬ ANTAŬPAROLO

Morgaŭ Alisa unuafoje iros en lernejon. Estos tre interesa tago. Hodiaŭ de mateno ŝiaj amikoj kaj konatuloj videofonas, kaj ĉiuj gratulas ŝin. Verdire, ankaŭ Alisa mem lasas neniun trankvila jam dum tri monatoj: ŝi rakontas pri sia estonta lernejo.

Marsano Buso sendis al ŝi iun konsternigan plumujon, kiun neniu sukcesis malfermi ĝis nun – nek mi, nek miaj samlaborantoj, inter kiuj estas du doktoroj de sciencoj kaj ĉefmekanikisto de nia zoo, interalie.

Ŝuŝaĉjo diris, ke li iros en la lernejon kune kun Alisa kaj kontrolos, ĉu ŝia instruistino estas sufiĉe lerta.

Estas mirinde multe da bruoj. Laŭ mia memoro, neniu tiel bruas, kiam mi unuafoje iris en lernejon.



Nun tumulto iomete malgrandiĝis. Alisa foriris al la zoo por adiaŭi al Bronĉjo.

Kaj dume en la hejmo estas trankvile, mi decidis dikti kelkajn okazaĵojn el vivo de Alisa kaj de ŝiaj amikoj. Mi resendos tiujn

dosierojn al la instruistino de Alisa. Por ŝi utilos scii, kun kiom malserioza homo ŝi devos rilati. Eble, tiuj notoj helpas al la instruistino eduki mian filinon.

De komence Alisa estis infano tia, kiaj estas aliaj infanoj. Ĝis ĉirkaŭ trijara aĝo. Tion pravas la unua okazo, kiun mi intencas rakonti. Sed jam post jaro, kiam ŝi renkontis Bronĉjon, ŝia karaktero montris kapablojn por fari ĉion ne tiel, kiel oni tion kutimas fari, malaperi en la plej netaŭgaj momentoj kaj eĉ hazarde eltrovi tion, kion la plej grandaj nuntempaj sciencistoj ne kapablis eltrovi. Alisa sciis utiligi por si siajn bonajn rilatojn kun aliaj personoj, sed, malgraŭ tio, ŝi havas amason da fidelaj amikoj. Sed al ni, al ŝiaj gepatroj, estas tre malfacile. Ĉar ni ja ne povas ĉiam resti hejme. Mi laboras en la zoo, dum nia panjo konstruas domojn, interalie, ofte sur aliaj planedoj.

Mi intencas averti la instruistinon de Alisa, ke, verŝajne, ankaŭ al ŝi ne estos facile. Do ŝi atente aŭskultu pri tute veraj eventoj, kiuj dum lastaj tri jaroj okazis al la knabineto Alisa en diversaj lokoj de Tero kaj de la kosmo.

MI KLAVUMAS NUMERON

Alisa ne dormis. Estas la deka horo, sed ŝi ne dormis. Mi diris:

– Alisa, tuj dormu, aŭ...

– Kio okazos "aŭ", paĉjo?

– Aŭ mi videofonas al Avino-Jagino (Avino-Jagino – unu el la plej popularaj roluloj de rusaj fabeloj; ogrino-sorĉistino, plej ofte ŝi estas malbona, sed iufoje ŝi helpas al ĉefrolulo per sia sorĉado).

– Kiu estas Avino-Jagino?

– Nu, tion infanoj ja devas scii. Avino-Jagino – Ostkrurulino estas terura, malica maljunulino, kiu manĝas malgrandajn infanojn. Malobeemajn.

– Kial?

– Nu, ĉar ŝi estas kolera kaj malsata.

– Kial do ŝi estas malsata?

– Ĉar ŝia kabano ne havas nutrodukton.

– Sed kial ne havas?

– Ĉar ŝia kabano estas treege malnova kaj situis malproksime en arbaro.

Tio estis tiel interesa por Alisa, ke ŝi eĉ sidigis sin en la lito.

– Ŝi laboras en nacia parko, ĉu?

– Alisa, dormu tuj!

– Sed vi ja promesis alvoki Avinon-Jaginion. Mi petas, paĉjo, kara, alvoku Avinon-Jaginion!

– Mi alvokos, sed vi tre ĉagreniĝos pri tio.

Mi iris al videofono kaj premis kelkajn hazardajn butonojn. Mi estis certa, ke konekto ne okazos kaj Avino-Jagino hejme "forestos".

Sed mi eraris. La ekrano de la videofo eklumis, heliĝis. Aŭdeblis klako, do iu premis ricevbutonon ĉe alia fino de la linio, kaj dormeca voĉo diris antaŭ ol bildo aperis sur la ekrano:

– Ambasadorejo de Marso aŭskultas vin.

– Kiel do, paĉjo, ŝi venos, ĉu? – Alisa kriis el dormoĉambro.

– Ŝi jam dormas, – mi kolere diris.

– Ambasadorejo de Marso aŭskultas vin, – ripetis la voĉo

Mi turnis min al la videofono. Juna marsano rigardis al mi. Li havas senokulharajn verdajn okulojn.

Pardonu min, – mi diris, – mi, verŝajne, eraris pri numeron.

La marsano ridetis. Li rigardis ne min, sed iun malantaŭ mia dorso. Kompreneble, Alisa forlasis la liton kaj staris sur la planko per nudaj piedoj.

– Bonan vesperon, – ŝi diris al la marsano.

– Bonan vesperon, knabineto.

– Avino-Jagino loĝas ĉe vi, ĉu?

La marsano demande rigardis min.

– Komprenu min, – mi diris, – Alisa ne sukcesas ekdormi, do mi intencis videofoni al Avino-Jagino, por ke ŝi punu ŝin. Sed fuŝis

la numeron.

La marsano ree ridetis.

– Bonan nokton, Alisa, – li diris. – Dormu, aŭ via paĉjo alvokos Avinon-Jaginon.

La marsano adiaŭis al mi kaj elŝaltis la aparaton.

– Nu, vi iros dormi nun, ĉu? – mi demandis. – Ĉu vi aŭdis tion, kion oĉjo de Marso diris al vi?

– Mi iros. Sed ĉu mi flugos al Marso kun vi?

– Se vi kondutos bone, do ni somere flugos tien.

Finfine Alisa ekdormis, mi daŭrigis mian laboron, kaj laboras ĝis la unua horo. Kaj je la unua subite obtuze eklekis la videofono. Mi premis la butonon. La marsano el la ambasadorejo rigardis al mi.



– Pardonu min pro tio, ke mi maltrankviligas vin tiel malfrue, – li diris, – sed via videofono ne estas elŝaltita, do mi opiniis, ke vi ankoraŭ ne dormas.

– Bone.

– Ĉu vi volas helpi nin? – la marsano diris. – La tuta ambasadorejo ne dormis. Ni traserĉis ĉiuj enciklopediojn, esploris la videofonan libron, sed ni ne sukcesas ekscii, kiu estas Avino-Jagino kaj kie ŝi loĝas...

BRONĈJO

Al ni, en la Moskvan zoon, oni alveturigis ovon de brontosaŭro. Ĉiliaj turistoj trovis la ovon en amaso da ŝtonoj sur bordo de Jenisejo. La ovo estis preskaŭ globa kaj mirinde bone konserviĝinta pro ĉiama frostoj. Kiam fakuloj komencis esplori ĝin, tiam ili malkovris, ke ĝi estas absolute freŝa. Do estis decidite meti ĝin en kovilon de la zoo.

Kompreneble, estis tre malmulte da tiuj, kiuj kredis je la sukceso, sed jam post unu semajno rentgenogramoj montris, ke la embrio de brontosaŭro disvolviĝis. Kiam pri tio oni anoncis per televido, sciencistoj kaj ĵurnalistoj komencis alflugi en Moskvon el ĉiuj landoj. Ni devis lui la tutan okdeketaĝan hotelon "Venuso" ĉe la strato Tverskaja. Sed ankaŭ en ĝin ni ne sukcesis loki ĉiujn. Ok turkiaj paleontologoj loĝis en mia manĝoĉambro, mi mem kun gazetisto el Ekvadoro trovis sian lokon en la kuirejo, kaj du publicistinoj de la gazeto "Virinoj de Antarktido" instalas sin en la dormoĉambro de Alisa.

Kiam nia panjo vespere videofonis el Nukuso, kie ŝi konstruas stadionon, tiam ŝi opiniis, ke fuŝis la numeron.

Ĉiuj komunikaj sputnikoj montris la ovon: flankon de la ovo, fronton de la ovo, skeletojn de brontosaŭroj kune kun la ovo...

Kongreso de kosmofilologoj plenkonsiste alveturis en la zoon por ekskursii. Sed antaŭ tio ni jam ĉesigis allasadon en la kovilon, do la filologoj sukcesis nur rigardi blankajn ursojn kaj marsajn mantojn.

Kvardek sesan tagon de tiu freneza vivo la ovo ektremis. Mi kun mia amiko profesoro Jakata tiumomente sidis apud la kloŝo, en kiu troviĝis la ovo, kaj trinkis teon. Ni jam perdis esperon pri tio, ke iu eloviĝos. Ĉar ni ja ne radioskopis la ovon plu por ne defekti nian "bebon". Krome ni ne povis prognozi almenaŭ pro tio, ke neniu ĝis ni provis kovi brontosaŭrojn.



Do jen, la ovo ektemis, duafoje ektemis, krevis, kaj el dika haŭteca ŝelo komencis elŝovi sin nigra kapo, simila al tiu de serpento. Ekĉirpis aŭtomataj kameraoj. Mi sciis, ke super la pordo de la kovilo eklumis ruĝa lampeto. Sur la teritorio de la zoo komenciĝis io tre simila al paniko.

Post kvin minutoj ĉirkaŭ ni amasiĝis ĉiuj, kiu devis esti tie, kaj multaj el tiuj, kiuj ne bezonis esti tie, sed tre volis. Tuj estiĝis tre malvarmege.

Finfine malgranda brontosaŭrido elrampis el la ovo.

– Paĉjo, kiel oni nomas ĝin? – ni subite aŭdis konatan voĉon.

– Alisa! – Miris mi – Vi kiel aperis ĉi tie?

- Kun ĵurnalistoj.
- Sed infanoj ja ne rajtas esti ĉi tie.
- Mi rajtas. Mi diris al ĉiuj, ke mi estas via filino. Do ili enlasis min.
- Ĉu vi scias, ke utiligi konatecon por siaj propraj celoj estas malbone?
- Paĉjo, sed malgranda Bronĉjo, povas esti, enuas sen infanoj, do mi ja venis.

Mi lasis fali la manojn. Mi ne havis eĉ unu liberan minuton por forkonduki Alisan el la kovilejo. Kaj ne estis iu, kiu konsentus fari tion anstataŭ mi.

- Staru ĉi tie kaj ne foriru, – mi diris al ŝi, kaj ĵetis min al la ĵus naskita brontosaŭro en la kloŝo.

Dum la tuta vespero mi kun Alisa ne parolis. Ĉar malamikiĝis. Mi malpermesis al ŝi veni en la kovilejon, sed ŝi diris, ke ŝi ne povas obei min, ĉar kompatis Bronĉjon. En la sekva tago ŝi ree penetris en la kovilejon. Kosmonaŭtoj de la ŝipo "Jupitero-8" enkondukis ŝin. La kosmonaŭtoj ja estis herooj, do neniuj povis malpermesi al ili.

- Bonan matenon, Bronĉjo, – diris ŝi, alirante la kloŝon.

La brontosaŭrido strabe ekrigardis ŝin.

- Kies estas tiu infano? – severe demandis profesoro Jakata.

Pli bone estus al mi trafali subteren ol suferi tian honton.

Sed Alisa vorton en la poŝo ne serĉas.

- Ĉu mi ne plaĉas al vi? – ŝi demandis.

– Ne, kial do, tute male... Mi nur pensis, ke vi, verŝajne, vojeraris... – La profesoro tute ne scipovis konversacii kun

malgrandaj knabinetoj.

– Bone, – Alisa diris. Mi morgaŭ vizitos vin, Bronĉjo. Ne enuu.

Vere, Alisa venis morgaŭ. Kaj venis preskaŭ ĉiutage. Ĉiuj kutimiĝis al ŝi kaj enlasis sen ajna demando. Mi lavis al mi la manojn. Nia domo almenaŭ situis apud la zoo, do oni ne bezonas transiri straton, kaj krome kunirantojn Alisa ĉiam trovis.

La brontosaŭro rapide kreskis. Post unu monato ĝi plilongiĝis ĝis du kaj duono metroj, kaj ni translokis ĝin en speciale konstruitan ejon. La brontosaŭro vagadis interne de ĉirkaŭbaro kaj maĉis junajn markotojn de bambuo kaj bananojn. Oni veturigis la bambuon el Hindio per ŝargaj raketoj, kaj farmistoj de Malahovka provizis nin per la bananoj. La cementa baseno, kiu situis meze la ĉirkaŭbaro, estis plenigita per saleta akvo. Tia akvo plaĉis al la brontosaŭro.

Sed neatendite ĝi perdis la apetiton. Dum tri tagoj bambuo kaj bananoj restis netuŝitaj. En la kvara tago la brontosaŭro kuŝigis sin en la fundo de baseno kaj metis la malgrandan nigran kapon sur la platan randon. Ĉio pruvis, ke ĝi estis mortonto. Tion ni ja ne rajtis toleri. Ni ja havis nur unu brontosaŭron. Nin helpis la plej spertaj kuracistoj en la mondo. Sed ĉio estis vane. Bronĉjo rifuzis herbon, vitaminojn, oranĝojn, lakton – ĉion.


Alisa ne sciis pri tiu tragedio. Mi forsendis ŝin al avino en Vnukovon. Sed la kvaran tagon ŝi ŝaltis televidilon ĝuste en tiu momento, kiam oni komunikis, ke la farto de la brontosaŭro pli malboniĝis. Mi ne scias, kiel ŝi konvinkis la avinon, sed jam tiumatene Alisa enkuris en la ejon de la brontosaŭro.

– Paĉjo! – ŝi kriis. – Kiel vi rajtis kaŝi tion de mi? Kiel vi rajtis?

– Poste, Alisa, poste, – mi respondis. – Nun estas konsiliĝo.

Efektive, estis konsiliĝo. Ni ja ne ĉesigis ĝin dum la tri lastaj tagoj.

Alisa silente deiris. Kaj post minuto mi aŭdis, ke iu ekĝemis apude. Mi ekrigardis antaŭen kaj vidis, ke Alisa jam transgrimpis la barilon, glitis internen de ĉirkaŭbaro kaj ekkuris al la muzelo de la brontosauŭro. En ŝia mano estis blanka pano.



– Manĝu, Bronĉjo, – ŝi diris, – aŭ oni pereigos vin per malsato. Ankaŭ min tedus bananoj, se mi estus ĉi tie anstataŭ vi.

Mi ankoraŭ ne sukcesis ĝiskuri la barilon, kiam nekredebla afero okazis. Tiu, kiu famigis Alisan kaj grave makuligis la reputacion al ni, al biologoj.

La brontosauŭro levis la kapon, rigardis Alisan kaj diskrete prenis la panon el ŝiaj manoj.

– Kvietigu vin, paĉjo, – Alisa minacis min per fingro, rimarkinte, ke mi intencis transsalti la barilon. – Bronĉjo timas vin.

– Ĝi faros al ŝi nenion malbonon, – diris profesoro Jakata.

Mi mem ja vidis, ke ĝi faros nenion. Sed kio okazos, se tiun bildon vidos la avino?

Poste sciecistoj longe diskutis. Kaj ĝis nun diskutas. unuaj diras, ke Bronĉjo bezonis ŝanĝon de nutraĵo. Aliaj, ke ĝi pli konfidis Alisan ol nin. Pro tio aŭ tio ĉi, sed la danĝero malaperis.



Nun Bronĉjo iĝis tute malsovaĝa. Malgraŭ tio, ke ĝi estas ĉirkaŭ tridek metrojn longa, ĝi ne scias pli grandan plezuron ol portadi Alisan sur si. unu el miaj asistantoj faris specialan ŝtupetaron, kaj kiam Alisa venas en la Broĉjan ejon, ĝi etendas al angulo sian longegan kolon, premas tiestarantan ŝtupetaron per siaj triangulaj dentoj, kaj lerte almetas ĝin al sia nigra brila flanko. Poste Bronĉjo portas Alisan tra sia ejo aŭ naĝas kun ŝi en la baseno.

TUTEKSOJ

Laŭ mia promeso Alisa akompanis min al Marso, kiam mi flugis tien por konferenco.

Ni alflugis sen akcidentoj. Verdire, mi ne tre facile toleras senpezan staton, do mi preferis ne levi min el fotelo. Sed mia filino dum tuta tempo papiliumis tra la ŝipo, kaj unufoje mi devis dekroĉi ŝin de la plafono en la gvidkajuto, ĉar ŝi estis prenonta ruĝan butonon, nome la butonon de urĝa bremsa. Sed pilotoj ne tre koleris kontraŭ ŝi.

Sur Marso ni trarigardis urbon, veturis en dezerton kaj vizitis la Grandajn kavernojn. Sed poste mi ne havis tempon por okupi min pri Alisa, do mi loĝigis ŝin en vartejon por unu semajno. Sur Marso laboras multaj teraj fakuloj, do marsanoj helpis ilin konstrui grandegan kloŝon por infana urbeto. En la urbeto estas bone, ĉar tie kreskas veraj arboj de Tero. Iufoje infanoj veturas por ekskursi. Tiam ili surmetas malgrandajn skafandrojn kaj vice foriras eksteren.

Tatjana Petrovna (la vartistino havas tiun nomon) diris, ke mi ne devas maltrankviligi min. Ankaŭ Alisa diris, ke mi ne maltrankviliĝu. Kaj mi adiaŭis al ŝi por la semajno.

Sed en la tria tago Alisa malaperis.

Tio estas absolute neebla evento. Almenaŭ pro tio, ke dum la tuta ekzistado de la vartejo neniu el ĝi malaperis nek eĉ perdiĝis pli longe ol dum deko da minutoj. En urbo sur Marso tute ne eblas perdiĝi. Kaj por tera infano, vestita en skafandro, fari tion estas eĉ pli neeble. unua renkontita marsano ja alkondukus lin reen. Krome ja estas robotoj. Kaj policistoj. Ne, oni ne povas malaperi en Marso. Sed Alisa malaperis.

Ŝi jam forestis dum ĉirkaŭ du horoj, kiam oni elvokis min de la konferenco kaj alveturigis en la vartejon per marsa saltanta ĉietraira

aŭto. Verŝajne, mi aspektis konsternita, ĉar kiam mi aperis sub la kloŝo, ĉiuj ĉeestantoj kompatinte eksilentis.

Verŝajne, ĉiuj, kiuj povis veni tien, tie ja ĉeestis: ĉiuj instruistoj, vartistinoj kaj robotoj de la vartejo, deko da marsanoj en skafandroj (ili bezonas surmeti skafandrojn, kiam ili eniras sub kloŝon, en teran aeron), pilotoj, estro de savistoj Nazarjan', arkeologoj...

Mi eksciis, ke dum tuta horo televida stacio en ĉiuj tri minutoj dissendis komunikaĵon pri tio, ke tera knabineto malaperis. Alarmo lumis sur ĉiuj videofonoj en Marso. Marsaj lernejo ĉesigis siajn lecionojn, kaj la lernantoj, ariĝinte en grupojn, traserĉadis la urbon kaj ĝian ĉirkaŭaĵon.

Oni rimarkis malaperon de Alisa, kiam ŝia grupo revenis post promenado. De tiam du horoj pasis. Oksigenon ŝia skafandro havis por tri horoj.

Mi konas Alisan, do mi demandis, ĉu oni trarigardis kaŝitajn angulojn en la vartejo mem kaj apud ĝi. Povas esti, ke ŝi trovis marsan manton kaj observas ĝin...

Oni respondis al mi, ke la urbo ne havas kelojn, kaj ĉiujn kaŝitajn lokojn traserĉis lernejoj kaj studentoj de la Marsa universitato, kiuj tre bone konas tiujn lokojn.

Mi koleris kontraŭ Alisa. Certe, baldaŭ ŝi kviete eliros de post angulo. Sed por la urbo ŝia ago estas pli granda katastrofo ol sabla ŝtormo. Ĉiuj marsanoj kaj tiuj teranoj, kiuj loĝis en la urbo, ĉesigis siajn proprajn okupojn. Estis alarmitaj ĉiuj savistoj. Kaj krome maltrankvilo jam efektive kaptis min. Ĉi tiu ŝia aventuro povis finiĝi malbone.

Senĉese komunikaĵo venis de serĉantoj:

"Lernantoj de la dua marsa antaŭgimnazio traserĉis la stadionon. Alisa ne estas ĉi tie", "Fabriko de marsaj dolĉaĵoj komunikas, ke la infano sur ĝia teritorio ne estis trovita"...

"Eble, ŝi ja trovis rimedon por eliri en dezerton? – pensis mi. – En la urbo oni jam trovas ŝin. Sed en dezerto... Marsaj dezertoj estas ankoraŭ ne tute esploritaj, kaj tie oni povas perdiĝi tiel, ke eĉ post dek jaroj ne estos trovita. Sed plej proksimaj regionoj de dezerto jam estas traserĉitaj per saltantaj aŭtoj..."

– Trovita ŝi estas! – subite ekkriis marsano en blua kitono, rigardante en poŝa televidilo.

– Kie? Kiel? Kie? – emociiĝis ĉiuj ĉeestantaj sub la kloŝo.

– En dezerto. Ŝi estis je ducent kilometroj de tie ĉi.

– Je ducent...?!

"Kompreneble, – pensis mi, – ili ne konas Alisan. Tion mi ja povas antaŭvidi pri ŝi".

– La knabineto fartas bone kaj baldaŭ venos ĉi tien.

– Kiel do ŝi ĝisiris tien?

– Per poŝta raketo.

– Kompreneble do! – diris Tatjana Petrovna kaj ekploris. Ŝi emociiĝis plej multe el ĉiuj. La aliaj ĉeestantoj komencis konsoli ŝin.

– Ni ja iris preter poŝtoŝtationo, kaj oni ŝarĝis aŭtomatajn poŝtajn raketojn. Sed mi preteratentis tion. Ĉar mi ja vidas ilin centfoje en ĉiu tago!

Kaj post dek minutoj, kiam marsa piloto enkondukis Alisan, ĉio fariĝis klara.

– Mi eniĝis tien por preni la leteron, – Alisa diris.

– Kiun leteron?

– Paĉjo, vi ja diris, ke la panjo skribos leteron al ni. Do mi enrigardis la raketon por preni la leteron.

– Vi penetris internen, ĉu?

– Certe. La pordeto estis malfermita kaj multe da leteroj troviĝis tie.

– Kaj poste?

– Tuj post kiam mi eniĝis tien, la pordeto fermiĝis kaj la raketo ekflugis. Mi komencis serĉi butonon por haltigi ĝin. Tie estas multo da butonoj. Kiam mi premis la lastan, tiam la raketo komencis malsupreniĝi, kaj poste la pordeto malfermiĝis. Mi eliris, sed ĉirkaŭe estis sablo, kaj onjo Tanja ne estis tie, kaj la infanoj ne estis.

– Ŝi premis la butonon de urĝa alteriĝo! – la marsano en blua kitono miris kun estimo en la voĉo.

– Mi iomete ploradis, kaj poste decidis iri hejmen.

– Kiel vi konjektis necesan direkton?

– Mi supreniĝis sur monteton por ĉirkaŭrigardi de tie. La monteto havis pordeton. De sur la monteto mi vidis nenion, nur sablon. Do mi eniris en ĉambreton kaj sidiĝis tie.

– Kiu pordeto? – la marsano miris. – En tiu regiono estas nur dezerto.

– Ne, tie estas pordeto kaj ĉambro. Kaj granda ŝtono situas en la ĉambro. Ĝi aspektas kiel egipta piramido. Sed kiel malgranda piramido. Paĉjo, ĉu vi memoras, ke vi legis por mi la libron pri egipta piramido?

Ŝia neatendita deklaro kaŭzis ŝtormon de emocioj al la marsanoj kaj al estro de savistoj Nazarjan'.

– Tuteksoj! – ili kriis.

– Kie oni trovis la knabineton? Koordinatojn!

Kaj duono de ĉeestantoj malaperis kiel vaporo.

Kaj Tatjana Petrovna, kiu prenis sur sin mem la devon satigi Alisan, rakontis al mi, ke antaŭ multe da jarmiloj sur Marso ekzistis mistera civilizo de tuteksoj. Nur ŝtonaj piramidetoj restis post ĝi. Ĝis nun nek marsanoj, nek teraj arkeologoj sukcesis trovi eĉ unu konstruaĵon de la tuteksoj, nur sablokovritajn ŝtonajn piramidetojn, kiuj dise situas en dezertoj. Kaj jen, Alisa hazarde trafis tuteksan konstruaĵon.

– Evidente, ŝi ree havis bonŝancon, – mi diris. – Sed malgraŭ tio mi tuj revenigos vin hejmen. Tie perdigu vin tiom da fojoj, kiom vi volos. Sen skafandro.

– Ankaŭ al mi pli plaĉas malaperi hejme, – Alisa respondis.

...Post du monatoj mi legis en la gazeto "Ĉirkaŭ la mondo" la artikolon, kiu estis titolita "Tiaj estis la tuteksoj". Oni rakontis en ĝi, ke oni finfine sukcesis trovi en dezerto gravegajn atestaĵojn de la tuteksa kulturo. Nun sciencistoj okupas sin pri deĉifrado de skribaĵoj, kiu estis trovitaj tie. Sed plej interesa estas tio, ke sur la piramideto troviĝas bildo de tutekso, prefekte konservita. Kaj en la gazeto troviĝis foto de la piramideto kun la portreto de tutekso.

La portreto ŝajnis al mi konata. Do terura suspekto ekreĝis en mia menso.

– Alisa, – mi tre severe diris, – konfesu veron, ĉu vi nenion desegnis sur la piramideto, kiam vi perdiĝis en la dezerto?

Antaŭ respondi Alisa aliris al mi kaj atente rigardis la bildon en la gazeto.

– Ĝuste. Vi estas desegnita, paĉjo. Kvankam mi ne desegnis, sed gratis per stoneto. Mi tiom enuis tie...

SINGENA ŜUŜAĈJO



Alisa amikas kun multaj animaloj: kun du katidoj; kun marsa manto, kiu loĝas sub ŝia lito kaj nokte imitas balalajkon ([balalajko: rusa popola korda muzika instrumento](#)); kun erinaco, kiu gastis ĉe ni dum nelonga tempo, kaj poste revenis en arbaron; kun la brontosauĝo Bronĉjo, kiun Alisa vizitadas en la zoo; kaj, krome, kun najbara hundo Reks, kiu, laŭ mia opinio, estas ne tre pursanga melhundo.

unu plian animalon Alisa akiris, kiam la unua ekspedicio revenis de Siriuso.

Alisa konatiĝis kun Poloskov dum solena reveno de la ekspedicio. Mi ne scias, kiamanere ŝi organizis tion: Alisa havas multon da kontaktoj. Iamaniere ŝi aperis inter infanoj, kiuj alportis florojn al la kosmonaŭtoj. Nur imagu mian miron, dume mi televidis, kiel Alisa kuras tra alteriĝa kampo, portante bukedon da bluaj rozoj, pli grandan ol ŝi mem, kaj enmanigas ĝin al mem Poloskov.

Poloskov prenis ŝin sur la brakojn, ili kune aŭskultis salutan paroladon kaj kune foriris.

Alisa revenis hejmen nur vespere kun granda ruĝa sako en la manoj.

– Kie vi estis?

– Mi plejparte estis en infanvartejo, – ŝi respondis.

– Do kie vi estis malplejparte?

– Ankoraŭ oni veturigis nin al la kosmodromo.

– Kaj poste?

Alisa komprenis, ke mi vidis ŝin per televidilo, kaj diris:

– Ankoraŭ oni min petis gratuli la kosmonaŭtojn.

– Kiu do petis vin?

– unu homo. Vi ne konas lin.

– Alisa, ĉu vi iam renkontis terminon "korpa puno"?

– Mi scias, tio estas kiam oni batas. Sed, tio okazas nur en fabeloj, mi tiel opinias.

– Verŝajne, estas necese el fabelo fari puran veron. Kial vi ĉiam miksas vin en maltaŭgajn aferojn?

Alisa estis ofendiĝonta al mi, sed subite la ruĝa sako ekmovis sin en ŝiaj manoj.

– Kio do estas tio?

– Tio estas donaco de Poloskov.

– Vi elpetis donacon al vi! Ĉu sen tio hontindaĵoj ne sufiĉas?!

– Mi elpetadis nenion. Tiu estas Ŝuŝaĉjo. Poloskov alflugigis ilin de Siriuso. Li estas eta ŝuŝao, "ŝuŝaido", se oni povas tiel diri.

Kaj Alisa zorge prenis el la sako malgrandan sesbrakan besteton similan al kanguruido. La ŝuŝaido havis grandajn libelajn okulojn. Ĝi rapide turnadis ilin, firme kroĉinte sin per la supra paro de manoj al vesto de Alisa.

– Rimarku, li jam amas min, – Alisa diris. – Mi preparos liton por li.

Mi sciis la historion pri ŝuŝaoj. Ĉiuj, sed speciale ni, biologoj, sciis la historion pri ŝuŝaoj. Nia zoo jam havis kvin ŝuŝaojn, kaj en tiuj tagoj ni atendis naskiĝon de idoj.

Poloskov kaj Zjeljonij eltrovis ŝuŝaojn sur unu el planedoj en la Siriusa sistemo. Tiuj ĉarmaj, nedanĝeraj bestetoj, kiuj ne lasis kosmonaŭtojn trankvila dum eĉ unu minuto, evidente estis mamuloj, kvankam iliaj moroj similis tiujn de pingvenoj. Ili havis saman trankvilan scivolon kaj ĉiam penis penetri en plej netaŭgajn lokojn. Foje Zjeljonij eĉ devis savi ŝuŝaidon, kiu intencis droni en granda vazo da densigita lakto. La ekspedicio faris filmon pri ŝuŝaoj, kiu ricevis grandan sukceson en ĉiuj kinejoj.

Bedaŭrinde, ekspedicianoj ne havis tempon por sufiĉe observi ŝuŝaojn. Estas sciita fakto, ke ŝuŝaoj ĉiumatene venis en restadejon de la ekspedicio, sed post noktiĝo ili malaperis, kaŝante sin inter rokoj.

Pro iu ajn kialo, sed kiam la ekspedicio jam revenadis, en unu el ejoj Poloskov trovis tri ŝuŝaĵojn, kiuj, verŝajne, perdis sin en la ŝipo. Verdire, Poloskov komence opiniis, ke unu el ekspedicianoj kontrabandis ŝuŝaĵon en la ŝipon, sed liaj kunuloj indignis tiom sincere, ke li rezignis sian suspekton.

La apero de la ŝuŝoj aldonis amason da problemoj. unue: ili povis esti kaŭzo de nekonataj infektoj. Due: ili povis pereji dum flugado, ne elteninte propran pligrandiĝintan pezon. Trie: neniu sciis, kion ili manĝas... Kaj tiel plu.

Sed ĉiuj antaŭtimoj montriĝis malveraj. Ŝuŝaĵoj bonege eltoleris seninfektigon, kviete nutris sin per buljono kaj fruktaj konservaĵoj. Pro tio Zjeljonij iĝis ilia morta malamiko. Li ŝatis kompoton, sed devis rifuzi ĝin al si dum lastaj monatoj, ĉar senbiletaj pasaĝeroj formanĝis ĝin.

Dum longa vojaĝo ŝuŝaino naskis ses ŝuŝaidon. Do la ŝipo venis al Tero plena je ŝuŝaĵoj kaj je ŝuŝaidoj. Ili monris sin kiel inteligentaj bestoj kaj kaŭzis malagrablaĵon kaj maloportunaĵon al neniu, krom Zjeljonij.

Mi memoras epokfaran momenton, kiam la ekspedicio revenis sur Teron, kameraoj alcelis malfermatan lukon, kaj, anstataŭ la kosmonaŭtoj, mirinda sesbraka besto aperis el la aperturo. Kelkaj samaspektaj, sed pli malgrandaj, animaloj eliĝis post ĝi. Ĝemo de miro ĉirkaŭiris la tutan Teron. Sed ĝi ĉesis en tiu momento, kiam ridetanta Poloskov eliris el la ŝipo post la ŝuŝaĵoj. Li portis ŝuŝaidon sur la brakoj, kiu estis malpuriĝinta per densigita lakto...

La zoo akceptis parton da tiuj bestetoj, ceteraj restis kun kosmonaŭtoj, kiuj ekamis ilin. Alisa ricevis ŝuŝaidon de Poloskov. Nur Dio scias, kiel Alisa sukcesis ĉarmi la severan kosmonaŭton.

Ŝuŝaĉjo loĝis en granda korbo apud la lito de Alisa, ne manĝis viandon, nokte dormis, amikis kun la katidoj, timis la mantolon kaj mallaŭte murmuris, kiam Alisa karesis ĝin aŭ rakontis al ĝi siajn feliĉojn kaj malfeliĉojn.

Ŝuŝaĉjo rapide kreskis kaj post du monatoj iĝis alta kiel Alisa. Ili promenadis en ĝardeneto kontraŭ nia domo, kaj Alisa neniam enkolringigis ĝin.

– Sed ĝi eble timigos iun, – mi riproĉadis, – aŭ aŭto transiros ĝin.

– Ne, li timigos neniun. Kaj krome, li ofendiĝus, se mi enkolringigus lin. Li ja estas tiom delikatsenta.

Iufoje Alisa neniel sukcesadis ekdormi. Ŝi kapricis kaj postulis, ke mi legu al ŝi pri la bona bestkuracisto Ajbolit.

– Mi ne havas tempon, filino, – mi diris. – Mia laboro urĝas. Interalie, venas la tempo por vi mem legi libron.

– Ĝi estas ne libro, sed mikrofilmo, kaj ĝi havas tre malgrandajn literojn.

– Sed ĝi ja estas sonebla. Se vi ne volas legi, do ŝaltu sonadon.

– Al mi estos malvarme, se mi leviĝos.

– Do atendu. Mi finskribos kaj poste ŝaltos.

– Se vi ne volas, do mi petos Ŝuŝaĉjon.

– Petu do, – mi ridetis.

Kaj post minuto el najbara ĉambro mi subite ekaŭdis delikatan mikrofilman voĉon el najbara ĉambro: "... Kaj krome Ajbolito havis hundon Avva".

Do Alisa ja leviĝis kaj atingis ŝaltilon.

– Tuj revenu en liton! – mi kriis. – Aŭ vi malvarmumos.

– Sed mi estas en lito.

– Ne decas mensogi. Kiu do ŝaltis mikrofilmon?

– Ŝuŝaĉjo.



Mi tute ne deziras, ke mia filino maturiĝu mensogema. Mi ĉesigis mian laboron, iris al ŝi, decidinte serioze paroladi.

Ekrano pendis sur muro. Ŝuŝaĉjo estris projekciilon, kaj sur la ekrano suferintaj bestoj amasiĝis antaŭ pordo de bona doktoro Ajbolito.

– Kiel do vi elpensis rimedon por tiel eldresi ĝin? – mi sincere miris.

– Mi ne dresis lin. Li mem povas fari ĉion.

Ŝuŝaĉjo sinĝene premis la suprajn manojn antaŭ la brusto.

Ni konfuzite eksilentis.

– Sed kiel do... – mi finfine diris.

– Pardonu min, – akuta raŭketa voĉo eksonis. Tion diris Ŝuŝaĉjo.
– Sed mi ellernis ĉion vere per mi mem. Ĉar tio ja estas facila.

– Pardonu min... – mi diris.

– Tio estas facila, – ripetis Ŝuŝaĉjo. – Antaŭhieraŭ vi mem montris al Alisa fabelon pri reĝo de mantoj.

– Ne, mi jam demandas ne pri tio. Kiel vi lernis paroli?

– Mi instruis lin, – Alisa diris.

– Mi komprenas nenion! Dekoj da biologoj laboras pri ŝuŝoj, kaj eĉ foje unu el tiuj ne diris eĉ unu vorton.

– Sed nia Ŝuŝaĉjo scias ankaŭ legi. Ĉu vi scias?

– Iomete.

– Li rakontis al mi amason interesajn aferojn.

– Mi kun via filino estas bonaj amikoj.

– Sed kiel do vi silentis dum tiom da tempo?

– Li ĝenis sin, – Alisa respondis anstataŭ Ŝuŝaĉjo.

Ŝuŝaĉjo mallevis la okulojn.

PRI UNU FANTOMO

Ni ĉiusomere loĝas en Vnukovo. Tio estas tre oportune, ĉar unurela trajno iradas tien, kaj de ĝi oni povas atingi somerdomon per dekminuta irado. En arbaro, aliflanke de fervojo, troviĝas fungoj: ruĝaj kaj malglataj boletoj, sed ili estas pli malmultaj ol tiuj, kiuj rikoltas fungojn.

Mi alveturadis al la somerdomo tuj de la zoo, kaj, anstataŭ ripozi, trafadis en tiean bolantan vivon. Kerno de tiu vivo estis najbara knabo Kolja, kiu estis fama en tuta Vnukovo per tio, ke li forprenadis ludilojn de infanoj. Al li eĉ psikologo arveturis el Vladivostoko kaj poste skribis disertaĵon pri la knabo Kolja. La psikologo esploris Kolja'n, dume Kolja manĝis konfitaĵon kaj lamentis dum tutaj tagoj. Por li mi alveturigis el urbo triradan fotonan raketon, por ke li malpli plendaĉu.

Ankoraŭ tie loĝis avino de Kolja, ŝi ŝatis paroladi pri genetiko kaj verkadis romanon pri Mendel; avino de Alisa, knabo Jura kaj lia patrino Karma, trio da ĝemeloj, kiuj loĝis en najbara strato kaj hore kantis apud mia fenestro, kaj, krome, fantomo.

La fantomo loĝis ie sub pomarbo kaj aperis antaŭ sufiĉe nelonge. Alisa kaj la avino de Kolja kredis je la fantomo, kaj neniu krom ili kredis.

Mi sidis kun Alisa sur teraso kaj atendis, kiam nova roboto de fabriko el Ŝjolkovo finkuiros semolinan kaĉon. La roboto rompiĝis jam dufoje, kaj mi kun Alisa mallaŭdis la fabrikon, sed ni mem preferis ne mastrumi, kaj nia avino forveturis en teatron.

Alisa diris:

– Li venos hodiaŭ.

– Kiu estas li?

– Mia fantomulo.

– Necesas diri "fantomo", sed ne "fantomulo", – mi aŭtomate ĝustigis, ne deturnante rigardon de la roboto.

– Bone, – Alisa decidis ne diskuti. – Do mi diru "mia konata fantomo". Kaj Kolja forprenis nuksojn de ĝemeloj. Ĉu tio ne estas mirinda?

– Estas. Kion do vi diris pri la fantomo?

– Li estas bona.

– Vi rigardas ĉiujn kiel bonaj.

– Krom Kolja.

– Jes, krom Kolja... Mi opinias, ke se mi alveturigus flamkraĉantan vipuron, do vi amikiĝus ankaŭ kun ĝi.

– Verŝajne. Ĉu ĝi estas bona?

– Neniu ĝis nun ne sukcesis konversacii pri tio kun ĝi. Ĝi loĝas sur Marso kaj ŝprucigas bolantan venenon.

– Verŝajne, oni ofendis ĝin. Kial vi, sciencistoj, forveturigis ĝin de Marso?

Al tio mi sukcesis respondi nenion. Tio ja estis pura vero. La vipuron oni ne demandis, kiam oni forveturigis ĝin de Marso. Kaj ĝi dum la vojo formanĝis ŝatatan hundon de la ŝipo "Kalugo", kaj pro tio ĉiuj kosmonaŭtoj ekmalamis ĝin.

– Nu, kio do estas pri la fantomo? Kion li similas? – mi ŝanĝis temon.

– Li vagadis nur tiam, kiam estas mallume.

– Kompreneble do. Tio ĉiam tiel estis. Vi tro aŭskultadis fabelon de la avinino de Kolja...

– La avino de Kolja rakontas al mi nur la historion de genetiko. Kaj kiel oni persekutis Mendel'on.

– Kaj, interalie, kion via fantomo faras dum bleko de virkoko?

– Nenion. Sed kial vi demandis?

– Oni devas scii, ke al honesta fantomo decas malaperi, terure malbenante ĉion, kiam virkoko matene blekas.

– Hodiaŭ mi demandos lin pri virkoko.

– Bone.

– Kaj hodiaŭ mi enlitiĝos pli malfrue. Mi bezonas paroli kun la fantomo.

– Konsentite. Bone, ni sufiĉe ŝercis. La roboto jam trokuiris la kaĉon.

Alisa sidiĝis por manĝi la kaĉon, kaj mi – por legi sciencajn raportojn de la Gviana zoo. Ili enhavas intereseajn artikolojn pri ukusamoj. Ĝi estas revolucio en zoologio. Oni sukcesis reproduktigi ukusamojn en mallibero. Idoj naskiĝis nigreverdaj, malgraŭ tio, ke ambaŭ gepatroj havis bluajn karapacojn.

Mallumiĝis. Alisa diris:

– Jen, mi iru.

– Kien?

– Al la fantomo. Vi ja promesis.

– Sed mi pensis, ke vi ŝercis. Tamen, se al vi estas tiom necese eliri en la ĝardenon, do iru, sed surmetu bluzon, ĉar malvarmiĝis. Kaj

deiru nur ĝis la pomarbo.

– Kial do mi irus plu? Li atendas min tie.

Alisa forkuris en la ĝardenon. Mi duonokule observis ŝin. Mi ne deziris rompi la mondon de ŝiaj fantazioj. Do ŝin ĉirkaŭu kaj fantomoj, kaj sorĉistinoj, kaj kuraĝegaj kavaliroj, kaj bonanimaj grandeguloj de fabela blua planedo... Kompreneble, se dum tio ŝi ĝustatempe enlitiĝos por dormi kaj normale manĝos.

Mi malŝaltis lumon sur la teraso, por ke tiu lumo ne malhelpu al mi observadi Alisan. Jen ŝi aliris la pomarbon, kiu estis maljuna kaj multbranĉa, kaj staris sub ĝi.

Kaj tiam... Blueta ombro deiĝis de la pomarba trunko kaj movis sin al ŝi. La ombro kvazaŭ naĝis tra aero, ne tuŝante herbon. Sekvantan momenton, kaptinte ion pezan, mi jam malsuprenkuris tra ŝtuparo, transsaltante tri ŝtupojn per unu paŝo. Tiu okazaĵo komencis ne plaĉi al mi. Aŭ tio estas malsprita ŝerco de iu, aŭ... Mi ne elpensis, kio estas "aŭ".

– Pli atentu, paĉjo! – Alisa laŭte flustris, aŭdinte miajn paŝon. – Vi fortimigos lin.

Mi kaptis Alisan je brako. Blueta figuro dissolviĝis en aero antaŭ mi.

– Paĉjo, kion vi faris! Mi ja preskaŭ savis lin.

Alisa hontinde ploraĉis, dume mi portis ŝin sur terason.

Kiu estis sub la pomarbo? Ĉu halucinaĵo?

– Kial do vi faris tion? – Alisa ploregis. – Vi ja promesis...

– Mi faris nenion, – mi respondis, – fantomoj ne ekzistas.

– Vi mem ja vidis lin. Kial vi diris malveron? Kaj li ja ne toleras movojn de aero. Ĉu vi ne komprenas, ke oni devas aliri lin

malrapide, por ke vento ne forblovu lin?

Mi ne sciis, kion respondi. Pri unu afero mi estis certa: kiam Alisa ekdormos, mi tuj eliros en la ĝardenon kun lanterno kaj traserĉos ĝin.

– Li donis leteron al vi. Sed post tio mi ne donos ĝin al vi.

– Kiun do leteron?

– Mi ne donos.

Nun mi rimarkis paperfolion, kiu estis enpremita en ŝia pugno. Alisa ekrigardis al mi, mi – al ŝi, kaj poste ŝi ja donis la paperfolion al mi.

Sur la paperfolio tabelo pri nutrado de ruĝaj krumsoj estis skribata per mia skribmaniero. Mi serĉis tiun paperaĵon jam dum tri tagoj.

– Alisa, kie vi trovis mian skribaĵon?

– Vi ja turnu ĝin. La fantomo ne havis paperon, do mi donis vian al li.

Sur la inversa flanko estis en la angla lingvo skribite per nekonata skribmaniero:

"Estimata profesoro!

Mi kuraĝis direkti min al vi, ĉar mi falis en malbonan situacion, el kiu mi ne povas eltiri min sen helpo de alia homo. Bedaŭrinde, mi ne povas ankaŭ forlasi rondon kun unumetra radiuso, kaj centro de tiu rondo estas la pomarbo. Oni povas vidi min en mia kompatinda stato nur dum mallumo.

Dank'al via filino, kiu estas delikatsenta kaj kompatema persono, mi finfine sukcesis ekkomunikiĝi kun la ekstera mondo.

Mi, profesoro Kuraki, estas viktimo de malsukcesa eksperimento. Mi eksperimentis pri transiĝado de la materio trans la spaco. Mi sukcesis transloki du meleagrojn kaj katon el Tokio en Parizon. Miaj kolegoj senprobleme ricevis ilin. Sed en tiu tago, kiam mi decidis eksperimenti pri mi mem, elektroklopoj rompiĝis ĝuste dum eksperimento, kaj energio mankis por translokado. Mi disiĝis en spaco, kaj mia plej koncentrita parto situas apud via estimata somerdomo. En tiu malĝoja stato mi estas jam duan semajnon, kaj, sendube, oni opinias min pereinta.

Mi petegas vin, kiam vi ricevos mian leteron, tuj telegrafu en Tokion. Do iu ajn riparu elektroklopojn en mia laboratorio. Tiam mi sukcesos materiigi.

Antaŭdanke,

Kuraki".



Mi longe fiksigardis mallumon sub la pomarbo. Poste malsupreniĝis de sur teraso kaj aliris pli proksime. Blueta, apenaŭ videbla brilaĵo balanciĝis ĉe la trunko. Enrigardinte, mi rimarkis konturon de homo. La "fantomo" petegante (tiel al mi ŝajnis) etendis la manon al la ĉielo.

Mi ne perdis tempon plu, ĝiskuris fervojon kaj de stacidomo videfonis en Tokion.

Ĉiuj tiuj agoj entute okupis dekon da minutoj.

Nur revenante hejmen, mi rememoris, ke mi forgesis enlitigi Alisan. Mi plirapidigis mian paŝojn.

Lumo en la teraso ne estis malŝaltita.

Tie Alisa montris siajn kolektojn de vegetaĵoj kaj de papilioj al nealta lacega japano. La japano tenis kaseroleton per la manoj kaj, fikse rigardante trezorojn de Alisa, delikate manĝis semolinan kaĉon.

Ekvidante min, la gasto riverencis kaj diris:

– Mi estas profesoro Kuraki, via eterna servisto. Vi kaj via filino savis mian vivon.

– Jen, paĉjo, tiu estas mia fantomo, – Alisa diris. – Nun vi kredas je ili, ĉu?

– Kredas, – mi respondis. – Tre agrable estas konatiĝi.

MALAPERINTAJ GASTOJ

Al renkonto kun labucianoj oni preparis sin solene. Ĝis nun gastoj de tiom malproksima stelo ne vizitis la Sunan sistemon eĉ unufoje.

Komence la stacio sur Plutono ricevis ilian signalon, kaj post tri tagoj la Londela observatorio komunikiĝis kun ili.

La labucianoj dume estis malproksime, sed kosmodromo Ŝerjementjevo-4 estis tute preta por akcepti ilin. Junulinoj de la oranĝerio "Ruĝa rozo" ornamis ĝin per girlandoj da floroj, kaj lernantoj de Supera Poeta Kurso finis prokludi muziko-beletran spektaklon. Ĉiuj ambasadorejoj rezervis al si lokojn por spektantoj, kaj ĵurnalistoj pasigis noktojn en kosmodromaj restoracioj.

Tiam Alisa loĝis ne tre malproksime, en la somerdomo de Vnukovo, kaj serĉadis vegetaĵojn por herbokolekto. Ŝi deziris, ke ŝia herbokolekto estu pli plena ol tiu de Vaĉja Ŝpic el grupo de pliaĝuloj. Do Alisa ne kontribuis por preparado al la solena renkontiĝo. Ŝi eĉ nenion pri ĝi sciis. Ĝi ankaŭ al mi mem koncernis ne rekte. Mia laboro devis komenciĝi poste, kiam la labucianoj jam alteriĝos.

Kaj dume eventoj sinsekvadis tiamaniere.

8-an de Marto la labucianoj informis, ke ili ĝisiras la cirklan orbiton. Kaj ĉagrena okazaĵo hazarde estiĝis proksimume en tiu sama tempo. Anstataŭ la ŝipo de la labucianoj, radiolokigiloj sekvis la svedan sputnikon "Nobel-29", perditan antaŭ du jaroj. Kiam oni ekkonsciis sian eraron, evidentiĝis, ke la ŝipo de la labucianoj malaperis. Ĝi komencis alteriĝon, kaj kontakto kun ĝi esis perdita por kelka tempo.

9-an de Marto la labucianoj informis, ke ili alteriĝis en ĉirkaŭ 55°20' nordan latitudon kaj en 37°40' orientan longitudon, laŭ tera

koordinatsistemo, kun eventuala 15'-a eraro; alivorte, en ĉirkaŭaĵon de Moskvo.

Poste la kontakto ĉesis, kaj oni ne sukcesis rekontaktiĝi, krom unu okazo, pri kiu mi rakontos malsupre. Nun evidentiĝis, ke surteraj radioj difektadis aparataron de la labucianoj.

Centoj da aŭtoj kaj miloj da homoj tuj ĵetis sin en la regionon, kie la gastoj alteriĝis. Vojoj estis plenaj je tiuj, kiuj intencis trovi la labucianojn. La kosmodromo Ŝerjementjevo-4 iĝis tute senhoma. Eĉ unu ĵurnalisto ne restis en ĝia restoracio. Pendantaj aŭtogiroj, helikopteroj, birdopteroj, ventoflugiloj kaj aliaj flugaparatoj plenigis la ĉielon ĉirkaŭ Moskvo. Ŝajnis, ke amasoj da grandaj kuloj, kiel nubegoj, leviĝis super la teron.

Se la ŝipo de la labucianoj eĉ subteriĝus, do ankaŭ tiuokaze oni sukcesus trovi ĝin.

Sed oni ne trovis ĝin.

Eĉ unu el ĉi-tieaj loĝantoj ne vidis alteriĝon de la ŝipo. Tio estis tre stranga afero, ĉar dum tiuj horoj preskaŭ ĉiuj loĝantoj de Moskvo kaj de ĝiaj ĉirkaŭaĵo direktedis siajn rigardojn en la ĉielon.

Sekve, fuŝo okazis.

Vespere, kiam mi revenis en somerdomon post laboro, la normala vivo de planedo estis tute rompita. Homoj timis, ke io malbona okazis al la gastoj.

– Povas esti, – oni diskutis en trajno, – ili konsistas el la antimaterio, do eniĝante en la teran atmosferon ili neniĝis, ĉu?

– Sen eksplodo, senspure, ĉu? Jen sensencaĵo!

– Sed ĉu ni scias multe pri kvalitoj de la antimaterio?

– Sed kiu radiis, ke li alteriĝis?

- Eble, iu ŝercemulo, ĉu?
- Kia mirinda ŝercemulo! Sekve, al Plutono parolis ankaŭ li, ĉu?
- Povas esti, ke ili estas nevideblaj?
- Ne gravas, oni per iu ilo ja trovus ilin...

Tamen hipotezo pri nevidebleco de la gastoj atingadis pli kaj pli multe da adeptoj...

Mi sidis sur la verando kaj pensis: ĉu ili alteriĝis tuj apuden, sur najbaran kampon? Nun ili staras, kompatindaj, ĉe sia ŝipo kaj miras, kial homoj ne volas rimarki ilin. Kaj baldaŭ ili ofendiĝos kaj forflugos... Mi jam estis malsupreniĝonta kaj ironta al la supremenciita kampo, kiam ekvidis vicon da homoj, irantaj el arbaro. Tiuj estis loĝantoj de najbaraj somerdomoj. Ili prenis la manojn unu de la alia, kvazaŭ ludantaj infanoj. Mi komprenis, ke pensoj, samaj al miaj, antaŭe venis al miaj najbaroj kaj nun tiuj palpe serĉas nevideblajn gastojn.

Kaj tiumomente ĉiuj radiostacioj en la mondo subite ekparolis. Ili dissendadis komunikaĵon surbendigitan fare de radioamatoro el Norda Aŭstralio. En la komunikaĵo oni ripetis koordinatojn, kaj poste sekvis la vortoj: "Ni troviĝas en arbaro... Ni ekspedis unuan grupon por serĉi homojn. Ni estos ricevantaj viajn radiosendaĵojn. Tre mirinda estas malesto de kontaktoj..." Post tio la komunikaĵo ĉesis.

La hipotezo pri nevidebleco de la gastoj tuj atingis kelkajn milionojn da pliaj adeptoj.

De sur la treaso estis videble, ke vico da homoj haltis kaj poste direktis sin reen al arbaro. Kaj en tiu momento Alisa supreniĝis sur la terason, portante korbeton da fragoj en sia mano.

- Kial ili ĉiuj kuradas? – ŝi demandis sen saluti min.

– Kiu estas "ili"? Decas diri "Saluton", se vi ekde la mateno ne vidis vian unusolan patron.

– Ekde la vespero. Mi dormis, kiam vi forveturis. Saluton, paĉjo. Sed kio okazis?

– La labucianoj perdiĝis, – mi respondis.

– Mi ne konas ilin.

– Neniu ankoraŭ konas ilin.

– Sed kiel do tiuokaze ili povis perdiĝi?

– Ili flugis al Tero, ĝisflugis kaj perdiĝis.

Mi sentis, ke mi diras sensencaĵon. Sed tio ja estis pura vero.

Alisa suspektante ekrigardis min:

– Sed tio ne povas okazi, ĉu ne?

– Ne povas. Kutime ne povas.

– Ĉu ili ne trovis kosmodromon?

– Verŝajne.

– Kie do ili perdiĝis?

– Ie apud Moskvo. Povas esti, ke tute proksime al tie ĉi.

– Kaj oni serĉadas ilin per helikopteroj kaj piede?

– Jes.

– Sed kial ili mem ne aliras?

– Verŝajne, ili atendas, kiam homoj aliros ilin. Ili ja unuafoje estas sur Tero, do ne malproksimiĝas de la ŝipo.

Alisa iom silentadis, kvazaŭ ŝi kontentiĝis per mia respondo. Ŝi dufoje transiris la terason, ĝis nun prenante la korbeton da fragoj per siaj manoj.

– Ili troviĝas ĉu en kampo aŭ en arbaro?

– En arbaro.

– Kial do vi scias tion?

– Ili mem diris. Per radio.

– Do bone.

– Kio estas bona?

– Tio, ke ili estas ne en kampo.

– Kial?

– Mi ektimis, ke mi vidis ilin.

– Kiel do?!

– Neniel, mi serĉis...

Mi eksaltis de sur seĝo. Certe, Alisa estas granda fantaziulino, sed...

– Mi ne iris en arbaron, paĉjo. Mi ĵuras, ke ne iris. Mi estis sur kampeto. Do mi ne vidis ilin.

– Alisa, diru ĉion, kion vi scias. Kaj ne aldonu proprajn fantazaĵojn. Ĉu vi vidis en arbaro strangajn... homojn?

– Mi ĵuras, ke mi ne estis en arbaro.

- Bone, sur la kampeto.
- Mi faris nenion malbonan. Kaj ili tute ne estas strangaj.
- Respondu ja laŭ homa maniero: kie kaj kiun vi vidis?
Ne turmentu min kaj tutan homaron en mia persono!
- Ĉu vi estas la homaro?
- Alisa, komprenu...
- Bone. Ili estas ĉi tie. Ili venis kun mi.

Mi nevole ĉirkaŭrigardis. La teraso estis senhoma. Se oni ne konsiderus grumblantan burdon, do oni povus trovi sur ĝi neniun, krom mi kaj Alisa.

– Ne, vi rigardas ja ne tien, – Alisa enspiris, aliris pli proksime kaj diris: – Mi intencis restigi ilin kun mi. Mi ja ne scias, ke la homaro serĉadis ilin.



Kaj ŝi etendis la korbeton da fragoj al mi. Ŝi alportis la korbeton preskaŭ ĝis miaj okuloj, kaj mi, ne kredante al mi mem, klare ekvidis du figuretojn, vestigitajn per skafandroj. Ili malpuriĝis per fraga suko kaj sidis duope sur unu bero, kiel sur ĉevalo.

— Mi ne kaŭzis doloron al ili, — Alisa diris per pentanta voĉo. — Mi opiniis, ke ili estas gnomoj el fabelo.



Sed mi jam ne aŭskultis ŝin. Zorge alpremante la korbeton al la koro, mi rapidis al videofono kaj pensis, ke al ili herbo povas ŝajni alta arbaro.

Tiel homoj unuafoje renkontis labucianojn.

SIA HOMO EN LA PASINTA TEMPO

Eksperimentadon pri maŝino de tempo oni okazigis en la Malgranda Halo de la Scienca Domo. Mi aliris en la infanvartejon por elkonduki Alisan al la hejmo, sed tie mi komprenis, ke se mi kondukus ŝin, mi malfruus por iri al la eksperimentado. Do mi prenis de Alisa la promeson, ke ŝi kondutos dece, kaj ni iris al la Scienca Domo.

Reprezentanto de la Instituto de Tempo, kiu estis tre granda kaj tre kalva viro, staris antaŭ la maŝino de tempo kaj klarigis ĝian strukturon al scienca publiko. La scienca publiko atente aŭskultis lin.

– Vi ĉiuj scias, ke la unua eksperimento estis malsukcesa, – li diris. – Katido, kiun ni sendis, atingis la komencon de la dudeka jarcento kaj eksplodis en la regiono de rivero Tunguzko, kaj pro tio naskiĝis la mito pri la Tunguzka meteorŝtono. Post tio ni ne spertis grandan malsukceson. Verdire, kaŭze de certaj universalaj leĝoj ([pri kiuj leĝoj ĉiu povas ekscii per broŝuro de nia instituto, se li deziras tion](#)), nun ni kapablas sendi homojn kaj objektojn nur en la sepdekan jarojn de la dudeka jarcento. Estas menciinde, ke kelkaj el niaj oficistoj vizitis tiun tempon, kompreneble, tute sekrete, kaj senprobleme revenis. La procedo por transporti sin tra tempo mem estas pli-malpli facila, sed por ĝi estis necesa nerimarkebla multjara laboro fare de centoj da homoj. Oni bezonas nur surmeti tempestran zonon... Ĉu iu el vi ne deziras supreniĝi al mi, por ke mi montru ordon de sinsekvaj agoj por pretigi transtempan vojaĝanton...

Konfuzinta silento fariĝis. Neniu decidis esti unua, kiu iris al la tribuno. Kaj jen, kompreneble, ĉe la tribuno aperis Alisa, kiu nur antaŭ kvin minutoj promesis konduti dece.

– Alisa, – mi kriis, – revenu tuj!

– Ne maltrankviligu vin, – la reprezentanto de la instituto diris, – nenio malbona okazos al la infano.

– Al mi nenion okazos, paĉjo! – Alisa gaje diris.

Ĉeestantoj ekridis kaj komencis ĉirkaŭrigardi, serĉante per okuloj severan patron.

Mi ŝajnis, ke mi absolute ne rilatas al tio.

La reprezentanto de la instituto zonis Alisan kaj fiksis iun umojn, similajn al kapaŭdiloj, sur ŝiajn tempiojn.

– Jen estas perfekte, – li diris. – Nun la homo estas preta al transtempa vojaĝo. Se ŝi eniros en la ĉelon, do ŝi tuj aperos en la jaro mil naŭcent sepdek kvin. "Kion li diras! – la panika penso fulmis en mia cerbo. – Alisa ja tuj uzos tiun eblecon!"

Sed jam estis tro malfrue.

– Kien vi iras, knabineto? Haltu! – la reprezentanto de la instituto kriis.

Alisa jam penetris la ĉelon kaj malaperis sub rigardoj de ĉiuj ĉeestantoj. La halo hore elspiris.

La paliĝinta reprezentanto de la instituto svingadis la manon, penante ĉesigi bruon. Kaj, vidante min kuri al li tra inter sidlokoj, klinis sin preskaŭ ĝis mikrofono, por ke estu pli aŭdeble, kaj diris:

– Nenio malbona okazos al la infano. Post tri minutoj ŝi denove aperos en la halo. Mi ĵuras, ke aparataro estas perfekte fidinda kaj elprovita! Ne maltrankviligu vin!

Al li estis facile rezoni. Dume mi staris ĉe la tribuno kaj pripensis la sorton de la katido, kiu transformiĝis en la Tunguzkan meteorŝtonon. Mi samtempe kaj kredis kaj malkredis al la preleganto. Nur imagu vin scianta, ke via infano nun troviĝas en tiu tempo, post kiu pasis preskaŭ cento da jaroj... Kio okazos, se tie ŝi kuros for de la maŝino? Kaj vojeraros!

– Ĉu mi povas sekvi ŝin? – mi demandis.

– Ne. Post minuto... Vi ja ne maltrankviligu vin, ĉar nia homo renkontos ŝin tie.

– Do tie troviĝas via oficisto?

– Ne, ne oficisto. Simple parolante, ni trovis personon, kiu perfekte komprenas niajn problemojn, kaj la dua ĉelo situis en lia loĝejo. Li loĝas tie, en la dudeka jarcento, sed iufoje aperas en estonta tempo pro sia profesio.

Tiumomento en la ĉelo aperis Alisa. Ŝi eliris al la tribuno aspektante kiel persono, kiu perfekte plenumis sian devon. Ŝi portis dikan malnovtempan libron sub sia brako.

– Jen vi mem konvinkiĝis... – la reprezentanto de la instituto diris.

La halo unuanime ekaplaŭdis.

– Knabineto, rakontu, kion vi vidis? – la preleganto diris, eĉ ne lasante min aliri Alisan.



– Tie estas tre interese, – ŝi respondis. – Bum! – kaj mi jam estas en alia ĉambro. Tie oĉjo sidis ĉe tablo kaj skribis ion. Li demandis min: "Ĉu vi, knabineto, estas el la dekdua jarcento?" Mi diris, ke verŝajne estas, sed mi ne kalkulis nian jarcenton, ĉar ankoraŭ malbone scipovas kalkuli, mi iradas en infanvartejon, en la grupon por mezaĝuloj. La oĉjo diris, ke tre agrable, kaj ke mi devas reveni. "Ĉu vi volas vidi Moskvon tian, kia ĝi estis, kiam via avo ankoraŭ ne ekzistis?" Mi diris, ke mi volas. Kaj li montris al mi ĝin. Ĝi estis tre mirinda kaj malalta urbo. Poste mi demandis pri lia nomo, kaj li diris, ke lia nomo estas Arkadio, kaj ke li estas verkisto, kaj verkas sciencfikciajn librojn pri estonta tempo. Evidentiĝis, ke li elpensadas ne ĉion, ĉar homoj el nia tempo iufoje venas al li kaj rakontas ĉion.

Sed li devas rakonti pri tio al neniu, ĉar tio estas tre ĝranda sekreto. Li donacis al mi sian libron... Kaj poste mi revenis.

La halo salutis rakonton de Alisa per brua aplaŭdado.

Post tiuj vortoj estiminda akademiano leviĝis kaj diris:

– Knabineto, vi tenas la unikan libron en la manoj, nome, la unuan eldonon de sciencfikcia romano "La makuloj sur la Marso". Ĉu vi ne povas donaci tiun libron al mi? Vi ja ankoraŭ ne scias legi.

– Ne, mi ne povas, – Alisa diris. – Mi baldaŭ scipovos kaj mem tralegos.